



Eldonas: Cercle espérantiste de * Abono por unu jaro : 15 FF
l'Agenais, F 47340 LAROQUE * (12 FF por Francio)
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux * al la ĉi-apuda pŝk.

Valo :

Ĉ U Z A M E N H O F
E S T I S " F A L L O K R A T O " ?

Kiel traduki tiun francan neologismon ? Ĉu peniskrato,
masklokrato, masklisto (hisp. machisto) ?

Dum la SAT-Amikara kongreso en Avinjono, kdo Duc-Goninaz faris rimarkindan prelegon, en kiu li montris, interalie, ke esperanto traktas la seks-ojn malegale kaj nesimetrie. Plej trafa ekzemplo estas la vortparo viro-virino. En "viro" la radikō hom' estas subkomprenata : viro = virhomo. En "virino" ĝi estas anstataŭata de vir' : virino = homino.

Eble Zamenhof estis influita de la Biblio :
"Ŝi estu nomata Virino, ĉar el viro ŝi estas prenita."
(Genezo, II, 23)

La logika vorto "homino" estas uzita en la zamenhofa traduko de Hamleto (Aktō V, sc.I, sceno de la tombistoj). Oni trovas ĝin ankaŭ en la Lingvaj Respondoj (respondo 23, La Revuo 1907, aŭgusto). Ni citu la tutan respondon :

" Pri pronomo por "homo"

"Kiam oni parolas pri homo, ne montrante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon "ĝi" (kiel ni faras ekzemple kun la vorto "infano"), kaj se vi tiel agos, vi estos gramatike tute prava. Sed ĉar la vorto "ĝi" (uzata speciale por "bestoj" aŭ "senvivaĵoj") enhavas en si ion malaltigan (kaj ankaŭ kontraŭkutiman) kaj por la ideo de "homo" ĝi estus iom malagraba, tial mi konsilus al vi fari tiel, kiel oni faras en la aliaj lingvoj, kaj uzi por "homo" la pronomon "li". Nomi tion ĉi kontraŭgramatika ni ne povas; ĉar, se ni ĉiam farus diferencon inter "homo" kaj "homino", tiam ni devus por la unua uzi "li" kaj por la dua "ŝi"; sed ĉar ni silente interkonsentis, ke ĉiun fojon, kiam ni parolas ne speciale pri sekso virina, ni povas uzi la viran formon por ambaŭ seksoj (ekzemple "homo" = homo aŭ homino, "riĉulo" = riĉulo aŭ riĉulino, k.t.p.), per tio mem ni ankaŭ interkonsentis, ke la pronomon "li" ni povas uzi por homo en ĉiu okazo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta. Se ni volus esti pedante gramatikaj, tiam ni devus uzi la vorton "ĝi" ne sole por "homo", sed ankaŭ por ĉiu alia analogia vorto; ekzemple ni devus diri: "riĉulo pensas, ke ĉio devas servi al ĝi" (ĉar ni parolas ja ne sole pri riĉaj viroj, sed ankaŭ pri riĉaj virinoj.)"

Do, la Majstro konstatis, ke "ĝi" estus korekta, sed li preferas "li".

Do, kvankam esperanto havas tri gramatikajn genrojn, la vorto "homo" estas en ĝi ne neŭtrala, sed virgenra. La franca lingvo, kiu havas nur du gramatikajn genrojn, ne distingas inter homme (mâle) = viro, kaj homme (être humain) = homo, kaj tiu vorto estas en ĝi virgenra: "les hommes naissent et demeurent libres et égaux". La germana, kiu havas tri genrojn kiel esperanto, distingas inter viro (Mann) kaj homo (Mensch), sed tiu ĉi estas ne neŭtrala, sed virgenra (der Mensch). Esperanto ne estas pli logika. En ĝi, kiel en la angla, estas nur unu formo por la artikolo (kaj por la adjektivoj) en la tri genroj; sed, havante kiel tiu lingvo tri pronomojn, ĝi privilegias la viran pronomon "li".

Koncerne la pluralan pronomon, esperanto havas

nur unu formon por la tri genroj: "ili", kiel la germana "sie" kaj la angla "they". Ni rimarku la similecon inter "ili" kaj "li". La franca estas iel pli logika, ĉar ĝi havas ankaŭ du pluralajn pronomojn:

il' ils
elle elles.

Logike ni devus rezervi "ili" por viroj, kaj uzi por inoj "iŝi" kaj por objektoj, bestoj kaj infanoj, konsekvence "iĝi" (ne estus danĝero pri konfuzo inter "iĝi" pronomo kaj "iĝi" verbo).

Ĉu ni diru, ke tio estus senutila balasto, tial ke angla kaj germana havas nur unu pluralan pronomon, kaj ŝajne ne bezonas pli?

Ni legas en Plena Gramatiko I, 46:

"Ĉe la pluralo, Esp-o, same kiel la angla aŭ la germana, havas nur unu formon por la tri genroj. Tio kelkfoje povas ĝeni: "Tiam Jesuo diris al ili (la virinoj): Ne timu; iru, diru al miaj fratoj, ke ili foriru en Galileon, kaj tie ili min vidos. Kaj dum ili iris..." (Mateo, 28,10-11). Kion reprezentas tiu lasta "ili", la virinojn aŭ la fratojn? "Rim.I. Por tiaj okazoj oni jam antaŭ longe proponis la akcesoran formon iŝi; sed ĝi ne enradikiĝis. Cetere la Z-a solvo estus la racia uzado de la pronomo montra anstataŭ persona: kaj tie ili min vidos. Kaj dum tiuj iris..."

Ĉu tiu solvo estas ĉiam ebla?

Iam, en kunveno ĉe la Verda Kato, mia amiko René Dubois demandis min: Kiel vi tradukus tiun poemeton de Viktoro Hugo:

"Autre Chanson"

- Comment, disaient-ils,
Avec nos nacelles
Fuir les alguazils ?
- Ramez, disaient-elles.
- Comment, disaient-ils,
Oublier querelles,
Dangers et périls ?
- Dormez, disaient-elles.

- Comment, disaient-ils,
Enchanter les belles
Sans philtres subtils ?
- Aimez, disaient-elles.

Se ni tradukus "ils" kaj "elles" indiferente per "ili", kiel ni scius, ke la unuaj "ili" estas viroj, kaj la dua virinoj ?

Nur en la 3a strofo oni povas kompreni, ke la unuaj estas viroj, ĉar ili deziras "ĉarmi belulinojn". Sed pri la dua restas dubo.

Kompreneble, en prozo oni ĉiam povas klarigi per perifrazoj, sed en versoj ? Mi konkludas, ke por poetoj "iŝi" povas en iuj okazoj esti necesa.

Ĉu harfendaĵo ? Ĉu ni ne devas celi, ke esperanto havu la eblecon esprimi ĉiujn nuancojn tiel precize kaj elegante, kiel ĉiu alia lingvo ?

Valo.

Ho, Vito, jen akvo por cia muelejo, ĉu ne ? (Red.)

B O T A N I K O :

P T E R I D O A G L A

Pterido (Pteris L. el polipodiacoj). Genro de grandparte tropikaj filikoj... (P.I.V.)

Pteridium aquilinum (= pteris aquilina) - Pterido agla - Fougère aigle.

La pterido agla estas filiko ofta en Gaskonaj arbaroj kaj ĉirkaŭaĵoj, konata kun la loka nomo "haouero" ; ofta ankaŭ en aliaj regionoj kaj landoj. Ĝenerale ĝi altas unu metron eĉ pli. La bestoj ne manĝas ĝin krom se nutraĵoj aliaj mankas. La lakto de la bovinoj kiuj sin nutras el tiu filiko estas danĝera. Laŭ D-ro Evans, la ofteco de stomakaj kancerroj estas pli granda en la nordo de Kimrio ol en la cetero de Britio : la tieaj bovinoj manĝata kiel legomo, la proporcio de stomakaj kancerroj estas la plej alta de la mondo : en tiu lando, oni preparas kun pterido agla konservaĵojn vendatajn sub la nomo "Warabi".

Dazun.

Tiu ĉi rubriko - kiel ĉiuj jam ekzistantaj aŭ kreataj - restas ĉiam malfermita kaj dependas nur de ĉies verkemo !

Yvette VIERNE : Estonteco de U.E.A.
(reago al numero 22)

Mi ŝatus respondi al la alvoko de Ĵakvino (mi estas UEA-anino) sed kiel ? Ne parolante pri spertoj de grupoj. Estas tro loke, tro parte. La respondeculoj de UEA estas seriozaj kaj kompetentaj. UEA dum la 3-4 pasintaj jaroj havas bonajn rilatojn kun UNESKO. Oni instigas la anojn aktive partopreni la decidojn kaj labori. La kongresoj kunigas 2000 ĝis 6000 personojn. Laŭ mi, ili estas altnivelaj (bedaŭrinde ne estas ĉiam sufiĉe da nemultekostaj loĝejoj). La revuo Esperanto estas bonnivela.

Kiel en SAT, en UEA estas nejunaj E-istoj, kiuj ne "lasas la lokon" al pli junaj, kaj tiel, senkonscie bremsas la movadon. Mi konscias, ke mia respondo estas nek kontentiga nek kompleta, sed estus tro longe...

Konklude mi fidus je la estonteco de UEA, kaj ĉefe de esperanto, sed ĝis la fina venko ni ne devas dormi !

Kribo : La estonteco de E estas nia afero.

Jam de la komenco la esperantistoj estis viziuloj, do specoj de "futurolagoj". Sed ili ja ne deduktis el la pasinteco la tre verŝajnan estontecon; male, ili starigis idealon antaŭ si kaj strebis realigi ĝin per siaj penoj kaj klopodoj. Ili "esperis", ke ilia deziro fariĝos realaĵo.

Efektive, ni forĝas ĉiutage la proksiman aŭ foran morgaŭon de la afero. Sed tiu afero estas ligita al nia ĉiutaga neesperantista aktivado, kiu mem grandparte dependas de la ĉirkaŭa medio.

Sed la esperantistaro ne adoptis komunan sintenon rilate al la socio. Dum iuj proklamas neŭtralecon de esperanto rilate al soci-politikaj aferoj, sed fakte ĉiam emas per siaj klopodoj agnoski la momente regantan sociordon (ekzemple petante "oficialan enkondukon de E en la lernejojn, agnoskon de E fare de ĉiuspecaj instancoj"), aliaj "fosas sian propran sulkon", plejofte kontraŭstare al la "establita" sociordo kaj seniluzie pri la rezultoj. Kompreneble, inter tiuj du esperantistaj tipoj ekzistas ĉiuj eblaj miksaĵoj,

kio evidentiĝas per la fakto, ke troviĝas ankaŭ "avangard-emuloj" en la neŭtrala E-movado kaj "komfortemuloj" ankaŭ en la neneŭtrala. Ĉar mi ĝis nun aktivis nur en la kadro de la neneŭtrala, ĉefe pri ĝi mi esprimu miajn banalaĵojn.

Mi ne diros, ke mi opinias pravaj la vidpunktojn de Ĵaklino (n°22) aŭ de Patriko kaj J.G. (n° 23), sed ja ili estas tiuj, kiuj plej proksimas al la mia.

Inter la unuaj e-istoj la plej fervoraj - al kiuj ni ĉiuj ŝuldas multon - esperis, ke esperanto alportos pacon al la mondo. Tiu speco ne malaperis. Tre parencas ilin la sennaciistoj de SAT, kiuj - iom simile al la marksanoj, kiuj kultas al Marks sen pripensi, ke liaj instruoj validis eble lia-tempe sed certe ne tute en la nuno - ne provis atente ekzameni la heredaĵon de Lanti.

Mi multe ŝuldas al Lanti - kiun mi ekkonis nur per legado de lia publikigita verkaro - kaj mi ĉiam trovas spiritan ĝuon relegante lin. Sed mi opinias, ke oni devus legi lin ĉiam memorante pri la epoko de lia verkado.

Estas vere, Ĵaklino, ke Lanti sendistinge kondamnis du malsamajn aferojn : nacion kaj naciŝtaton. Li prave skurĝis la plagon "naciismo" en epoko kiam ĉiuj kultis al ĝi. Pri tio li estis vera pioniro. Aliflanke, li - same kiel liaj samtempoj - kultis al la dio Progreso kaj al la kundio Racio, kiuj - en tiu epoko - aspektis kiel la savontoj de la homaro. Lanti vidis, ke tiun "Progreson" bremsas la lingvodiverseco kaj la al ĝi ligitaj naciismoj ; li elpensis "sennaciecan mondon" surbaze de memstare pensantaj, aŭtentikaj mondĉivitanoj, kun tutplaneda aranĝo de la ekonomio, ekspluatado de la terriĉaĵoj, ktp. Li iel jam anticipis la nun kutimajn nociojn pri ekologio kaj memmastrumado. Aliflanke, li definitive klasifikis kiel "reakcia" la emon de etnoj al pluvivado kiel etnoj kaj estas vere, ke en la epoko de Lanti, la etnistaj movadoj estis ligitaj al obskurantismo.

Sed nun ni estas en la fino de 1979 kaj ekzamenas la eblan estontecon de E-o ! Ni uzu tion uzindan el la malnova materialo postlasita al ni fare de la pioniroj. Ne utilas kondamni nek kultu. La "sennaciismo" de Lanti, miaopinie, povas fekundigi la nunajn movadojn ekologian, etnisman, memmastruman, sed ni ne blinde disĵetu la grajnojn. Iuj ne plu estas vivodonaj, aliaj estus danĝeraj.

Mi opinias, ke la mondo - kaj do ankaŭ E - havos estontecon

nur se ni detruos la naciŝtatojn kaj la kulton al la nova dio "Progreso". Esperanto kaj SAT, do fakte ĉiu el ni, havas sian modestegan sed realan rolon en tiu strebado, kondiĉe ke ni elektu la "grajnojn" uzendajn por la difinita celo :

- se ni deziras plu fortikigi la naciŝtatojn - do pliigi la militriskojn, do la tutmondan frenezon - ni plu abdiku antaŭ ili, atendante ĉion de la profesiaj ŝtatpolitikuloj (dekstraj aŭ "maldekstraj"), inkluzive de la agnosko de nia sankta, "mirinda" kaj genia Esperanto. Ni, ekzemple, plu kondamnu ĉian emon al regiona, etna memmastrumado, kaj ankoraŭ pli fortikigu la centralizismon.
- se ni deziras lasi al niaj posteuloj ŝancon por pluvivado - eĉ se etan - ni klopodu ĉiamaniere bojkoti la centralizismon, la naciŝtatojn, la frenezan konsumadon. Ni strebu do al memstareco de la individuoj, de la grupoj, de la federaciigintaj etnoj. Uzante esperanton inter ni, ni kontribuas al tiu malcentralizado, kiun ni kiel eble plej favoru per plimultigo de la specifaj E-grupoj kaj asocioj. Ni riĉigu la tutan movadon per nia diverseco anstataŭ ĝin steriligi per artefarita unueco kuŝanta sur netuŝeblaj dogmoj : "neŭtraleco" tie, "sennaciismo" tie ĉi. Ni multigu la individuajn, grupajn, lokajn iniciatojn. Ni kalkulu nur kun ni mem. Tio estas tre malmulte - mi konfesas - sed kion pli firman trovi ?

Kribo

Ni nun petas pardonon de niaj - tre malmultaj - legantoj en Britio, kiuj eble jam legis la ĉi-postan tekston en "Esp-o en Skotlando" aŭ "The Worker Esperantist". Temas pri ekstrakto el artikolo aperinta en "Esperanto en Skotlando". La aŭtoro : William Auld. La temo : tre proksima al "Estonteco de Esperanto". Ni senhonte represas ĝin, esperante per ĝi iom mildigi eventualan pesimismon ĉe la legantoj de "Laŭte!". (Red.)

ESPERANTO - NE DETRUEBLA

"Laŭ ĉiuj ĝisnunaj signoj, la lingvo Esperanto estas nedetru-ebla. Spite al ĉiuj malkuraĝigoj, ekde mortigo kaj enkarcerigo ĝis mokado kaj ignorado de la esperantistoj, la lingvo pluvivas, la movado obstine aktivas, homoj finlernas ĝin, ĉu en izoleco, ĉu en la grupoj ; multaj homoj, kiuj nek fin-

lernis nek iam finlernos ĝin tamen restas fidelaj al ĝi dum la tuta vivo ; homoj subtenas ĝin per sia mono kaj per sia laboro ; malsukceson en unu loko kompensas sukceso en alia loko ; se mortas aŭ forfalas unu ŝlosila figuro, stariĝas alia por lin anstataŭi ; kreskadas la literaturo de Esperanto dank' al la verkistoj kaj la eldonistoj, kaj malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj de malgrandskala internacia komercado la homoj aĉetas librojn kaj revuojn en Esperanto ; malgraŭ mondmilitoj, persekutoj kaj pogromoj Esperanto estas reala fenomeno. Ĝi allogas adeptojn plej diversajn : intelektulojn, laboristojn, revemulojn, praktikulojn, religiulojn, ateistojn, idiotojn, geniulojn, homojn sociemajn kaj homojn, kiuj ŝatas aliĝi al sekretaj societoj : kion krom la lingvo ili posedas komune ?

"En la unua periodo de la lingvo tio ŝajnis evidenta, kaj oni parolis pri 'la interna ideo' ; hodiaŭ tiu frazo tro odoras por ni, generacio pli skeptika, je mistikismo kaj ĝena entuziasmo. Ni ŝajnigas nin praktikuloj, ni evitas aspekti antaŭ la publiko kiel stranguloj. Kaj prave. Kaj tamen devas ekzisti iu klarigo pri tio, ke homoj en ĉiuj landoj estas pretaj sin dediĉi al tiu ĉi lingvo kaj eventuale suferi - ĉu fizike aŭ alimaniere - pro ĝi. Ĉu simple temas pri tio, ke por tiuj homoj el la plej diversaj mondpartoj la homa unueco estas pli ol abstrakta koncepto, nome, profunde sentata realaĵo ? Ĉu ni povas diri, ke tiuj asocioj por Mondkonstitucio kaj Mondparlamento, kiuj rifuzas agnoski la disigan kaj diferencigan potencon de la lingva diverseco, same profunde sentas ĝin ? Aŭ ĉu ni rajtas konkludi, ke ili, eĉ ne sincere, nur ludas ludon sed veran konvinkigon ne havas ? Ĉu ili estas tiel ligitaj subkonscie al sia nacieco, ke ili ne kapablas merĝi ĝin kun ĉiuj aliaj naciecoj en komuna homareco ? La lingvo Esperanto celas detrui nek naciecojn nek naciajn lingvojn ; male, ni vidas ĝin kiel ŝirmilon kontraŭ diskriminacioj : diskriminacio lingva kaj diskriminacio nacia. Sed, ho ve! kiom multaj homoj estas delogitaj de tio, kion mi nomis la ciferoludo : pli da homoj parolas la anglan, do ĉiuj devas ĝin paroli ! malmultaj parolas gaele aŭ kimre aŭ vaske - do tiuj rezignu pri sia lingvo kaj parolu kiel parolas la grandaj nombroj ! Multnombro estas la sola atentinda kriterio ! (En la Mondparlamento ĉiuj estos egalaj kaj parolos angle (se tion permesos la rusoj kaj la ĉinoj kaj la japanoj kaj la araboj kaj la germanoj kaj la francoj, alie necesos dungi sennombrajn interpretistojn kaj tradukistojn, sed sendube la Mondparlamento super-

regos ĉiujn riĉaĵojn de la mondo kaj sekve povos facile pagi tiujn servojn dum ordinaraj homoj ie kaj tie mizeras kaj malsatas).

Ha! mi rimarkas, ke hodiaŭ mi predikas kiel pastro al la konvertitoj. Pardonu, mi emociiĝis ĝis tiu grado, ke mi fariĝis sarkasma pri bonintencaj homoj. Sed bonintenco ne sufiĉas per si mem. Homoj finfine rajtas malŝati Esperanton ĉar ĝi ŝajnas al ili malbela, aŭ ĝin kreis judo, aŭ ĝi karambolas kun ilia propra politika konvinkigo, aŭ pro cent aliaj motivoj. Sed hodiaŭ nur malhonestulo povas diri, eksplicite aŭ implicite, ke Esperanto ne vivas, ne estas uzata, ne funkcias perfekte, ne posedas literaturon, ne estas kulture valora ; ĉar la plej malgranda honesta esplorado pruvus la malverecon de tiuj asertoj. Kaj mi esperas, ke en tiu ĉi mondo la malhonestuloj ne venkas fine. Almenaŭ ni ne timu ilin. Ni estu mem honestaj. Kiel mi diris pli frue, ni rigardu nin mem ; ni ekzameni nian aferon, kaj ni juĝu laŭ la faktoj. Kiel mi diris pli frue, homo rajtas kredi, kion ajn li volas. Mi kredas pri la estonteco de Esperanto, alia kredas pri ĝia fiasco ; sed tio nenion signifas kaj neniom valoras. Valoras nur faktoj, kaj ŝajnas al mi, ke la faktoj historiaj kaj aktualaj, zorge pesitaj, subtenas Esperanton."

William Auld.

Antoni Madej : "ESPERANTO-GRAMOJ"

Nia kontribuo

Ne nur poezio

ankaŭ amo nia,

estas kontribuo

al la mondkulturo.

Denaskaj esperantistoj

Tiu ĉi amata konsekvenco

Estas signo pri nia potenco !

Geedza amo

Milito

en lito.

Virinoj

Elito

de litoj.

La plej eta epigramo Ad-amo.

La du postaj paĝoj estas ekstrakto el la E-frazeologio, baldaŭ eldonata de "Laŭte!" (vidu p. 16! kaj mendu tuj!).

1. Aĉeti, vendi firme, kontante, kredite, monatpage, pogrande, popece, pometre, malprofite, telkele, aukcie (per plidono), je minimuma, fiksa, modera prezo.
- Fari komercon. Vendi ion por iom da neniom. Vendi ĉapelon por (kontraŭ) 10 frankoj. Vendi ĉion por plej bagatelaj prezoj. 150 rublojn la frako kostas kaj en la bazaro, li ĝin forblovis por dudeko da rubloj. Kiel per turno de mano, ĉio malaperis. Por tiu prezo la vesto ne estas kara (estas "ĉipa").
- Ŝakri. Brokanti. Kolporti. Tiu drapo kostas po dek frankojn por metro. Aĉeti vinon po dek boteloj. Vendi cigarojn po skatolo.
- Vendado de artiklo estas facila, malfacila, deficitata, profitdona. / Tiu komercaĵo havas grandan debiton. / Debiti.
5. Konkurenclojala, mallojala. Fikomercisto. / Reĝimo de libera konkurenclo. Prospera komerco. / Altigi la prezojn.
- Por vendisto mensogo estas necesa apogo. La bazaro estas tenata ĉiun merkredon. Fiŝbazaro. Pulbazaro. / La legombazaro montris la tutan gamon de verdo. Iri serĉi provianton en la kamparo, en la bazaro. / Fruaĵoj. / Ĉu sufiĉas la provizo de viando ?
- Oferti, proponi varon al kliento. Garantii pri la kvalito de varo. Mane pesi brasikon. / Fari bruan reklamon (per afiŝo, per afiŝhomo, prospektoj). Reklami, tamburi, tantami, distrumpeti.
- Proponi tre avantaĝajn, definitivajn, firmajn prezojn. La ondiĝo de la prezoj. / Tro pipritaj, salitaj prezoj. Intersezonaĵo rabataĵoj. Vendi rabate. 50% da rabato.

Aĉeti, pagi kontante. / Apunto.

- Marĉand(ad)o aĉeti ne devigas. Oni donas nenion por nenio. Kostu, kiom ĝi koston, mi... Je kia ajn kosto. Akiri ĉiapreze. Pagi per bonaj, sonantaj taleroj. Ĉiu malfruiĝo ĉe la pagado ĉesigos la liveradon. / Deponi sumon en la manojn de triulo (kiel garantiaĵon). Demonstristo. Bazarulo. KREDU MIN, SINJORINO.
10. Magazeno, butiklo, ĉiovendejo, superbazaro. Ĉenbutiko. / Komerci je sia propra konto. Diversfaka komerco. Multklienta butiklo. / Komiz(in)o. Ekspone robajn en la fenestro de la magazeno. La morta sezono por la ĉapelistoj. Sezona komerco. Inventari siajn komercaĵojn. Malkovri, anonci deficiton. /
- Kalkuli la kasmonon en la fino de la tago. Trovi la kason malplena. Kompensi. / Fakturo. Debeto. Kredito. Saldo. / Ekpago. Kvitanco.
- Trabutiki. Rigardi kaj aspiri ne signifas akiri. Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro. Tiu magazeno afiŝas grandrabatan vendon. / Mi ne povas permesi al mi la aĉeton de tiuj luksaĵoj (kiuj) ĉiam atingas altan prezon. Mi domaĝas la prezon. / Mi akiris ...on je malalta prezo.
- Grandkomercisto. Enriĉiĝinta komercisto. Enketi pri la solventeco de negocisto. / Vojaĝo, migra komizo. La provizio de komerca reprezentanto, vojaĝanto. Havi agenturon en sukero, Portovino. / Kiu estas via agento en Parizo ?
- MERKATO de la lano, kafo. La Eŭropa Merkato. La libera merkato. La nigra merkato. La sukermarkato estas saturita. / Serĉi novajn merkatojn. Studo pri novaj merkatoj. Oni devas fari merkatesploron tute larĝan. /

L A R Z A K O :

En la artikolo de Nicole mi legis : "Esperanto havas ŝancon en la Larzaka medio, ni devus pripensi pri ebla agado." (Laûte n°22). Jes, ŝi tute pravas ! Jam plurfoje la montpelieranoj sukcesis prezenti budon (aù parton de budo) pri E. Jen kion mi proponas :

- 1) Ĉiuj E-istoj, kiuj "laboras" por Larzako, interrilatiĝu kaj interkonatiĝu. Mi akceptas esti la leterkesto.
- 2) Larzac-Université. Mi ricevas alvokon, kiu petas de ĉiu ano "konatigi la domon (Montredon) al grupoj, kiuj povas veni tien ĉi, ĉu por labori, ĉu por malkovri Larzakon, ĉu simple por ferii". Estus taŭge organizi E-semajno(j)n, kun kurso. (Ni povus venigi eksterlandanojn!...).

Pri tio malfacile mi povos zorgi, sed feliĉe estas multaj aliaj.

Yvette VIERNE

(5 rue Dr Roux, F 34100 MONTPELLIER)

Kiu ne ŝatas ludi ? Kiu ne ŝatas amuziĝi ? Kiu ne ŝatas humuron ?

Vi povas ludi, amuziĝi kaj samtempe instrui vin, solvante la multajn krucvortenigmojn kaj atente rigardante la diversajn humuraĵojn de la libreto "Instrua Amuzo", kiun verkis 2 ĉeĥoslovakoj Stano Marĉek kaj Stano Markoviĉ.

Kaj fakte, ĉu vi ne opinias, ke tiuj amuzĝenroj mankas en nia E-literaturo ?

Ĉiu interesata leganto bonvolu mendi unu aù plurajn ekzemplerojn al : Louis ENSUQUE, 1 rue des Piboules

F 34100 MONTPELLIER, pĉk : 2 232 25 G Montpellier

Ĉiu volumo kostas 12 FF inkluzive la sendokoston.

NANCIO : Bela turisma informilo en Esperanto estas havebla ĉe : Office du tourisme, place Stanislas, F 54000 NANCY.

OBERKIRCH ĉe vinstrato : La E-grupo dis vendas belan glumarkon por aŭtomobiloj en Esperanto pri Oberkirch, la E-strato (meze en la kvartalo de la franca armeo, sed ŝŝŝ, tion ne klaĉu!) kaj la vinstrato. Sekretario de la grupo estas Hermann HEISS, Lohstrasse 48, D 7602 OBERKIRCH.

NE al ĈIA MIZERO !

(Tiu ĉi artikolo prezentas la movadon "Aide à toute détresse - Quart Monde", 107 av. du général Leclerc, F 95480 PIERRELAYE, pĉk Paris 13551 80 C, kiu luktas kontraŭ mizero en industriaj landoj).

50% de la eŭropanoj kaj 56% de la francoj opinias, ke ne ekzistas mizeruloj en ilia ŝtato. Sed ankaŭ en industriaj landoj ekzistas homoj, kiuj devas eduki multajn infanojn sen scii, ĉu morgaŭ ili havos ion por manĝi, kiuj devas elteni humiligadon kaj maljustecon, kiuj devas senĉese serĉi laboron, tegmenton, sekurecon, malgraŭ sia malbona farto pro ĉiaj mankoj kaj nesufiĉa higieno. Ĉu vi scias, ke :

- laŭ enketo farita en Metz en 1976, 13,5% de la patroj kaj 41% de la patrinoj de infanoj helpataj de sociaj servoj mem dependis de sociaj servoj, kiam ili estis infanoj ?
- en Reims, en 1976, 2000 familioj (inter 27 000) vivis per malpli ol la minimuma salajro, t.e. tiam, malpli ol 1300FF monate ?
- 10% de la junaj francoj serĉantaj laboron estas kvazaŭ analfabetaj ?

Tiun medion oni nomas per neologismo 'Kvara Mondo. Pastro Joseph WRESINSKI decidis kunvivi kun ili, kaj kreis la solidarmovadon "Aide à toute détresse - Quart Monde". Tiu movado volas esti nek bonfara asocio, nek sociokultura asocio, nek sindikato, nek partio, nek eklezio, sed movado malfermita por ĉiuj, kiuj volas konstrui civilizacion (kaj konsekvence socion) per tuta renverso de niaj antaŭrajtoj, per redistribuo de niaj rimedoj profite al la Kvara Mondo, kaj speciale al la plej malfavorataj.

Tiu konstruado baziĝas sur libervola aktivado por dividi kun la Kvara Mondo la plej taŭgajn rimedojn por atingi parolrajton kaj kulturon. Tiu libervola aktivado celas ebligi al la homoj de la Kvara Mondo samtempe disvolvi siajn virtualajn eblojn kaj mem fariĝi aktivantoj por la rajtoj de la plej malfavorataj.

Konkrete, vi povas :

- informiĝi pri la Kvara Mondo, aĉetante la diskon "La Suno leviĝas" (45FF), la libron kun fotoj kaj tekstoj pri la

infanoj de la Kvara Mondo, aŭ la Oran libron de Infanoj de la Kvara Mondo.

- por scii pli, aboni la monatan informilon de la movado.
- partopreni en kunvenoj, dum unu semajnfino, dum unu semajno, dum du semajnoj, dum tuta jaro, ktp...
- subskribi kaj subskribigi petskribon kontraŭ la mizero en Francio.
- financi la movadon aŭ aliĝi al ĝi.
- partopreni en la kompilado de internaciaj dosieroj, ekz. per tradukado.
- animi bibliotekon en malriĉa kvartalo, en infangrupo.
- krei aŭ subteni komitaton por respekto de la rajtoj de la Kvara Mondo (loĝado, laboro, sano, ktp).

(informartikolo verkita de Jakelino surbaze de dokumentoj de la asocio).

Nia kriminala felietono (daŭrigo)

Restinte unu monaton en la malliberejo de Fresnes, Jean FABRE estis denove juĝita de la armea tribunalo de Parizo. La verdikto, 6 monatoj da mallibero, inter kiuj 5 kun prokrasto, signifis tujan liberigon. La franca ministro pri demenco liberigis Jean FABRE el la devo servi lian nacion *, kaj Jean FABRE povis daŭrigi sian aktivadon kiel ĝenerala sekretario de la Partio Radikala Itala.

* nia gramatika lecioneto : la vorto lian signas, ke temas pri la nacio de la ministro.

Blago :- Per kio oni rekonas liberpensulan vegetaron ?

- Li ne manĝas viandon, kiam ne estas vendredo.

Anonceto : Araneo serĉas helikon por kune ĉasi krokodilojn. (anonceto esotera rezervita al iniciitoj).

- Aŭskultu, admonas la kamelino al sia ido, se ci ne estos trankvila, ci ne rajtos dezerton...

Ĉe la psikiatro : - Kaj ĉu jam de longe - demandas la psikiatro - vi imagas vin kokino ?

- Nu, tio okazis jam kiam mi estis tute juna kokido...

Nur por homoj scipovantaj la francan !

E K O L O G I O : Philippe Dufetelle subtenis la 28an de majo 1979 en Tuluzo sian doktorecan tezon pri medicino... Tiu tezo studas la nocumojn kaj riskojn prezentitajn de la projekto pri starigo de nuklea centralo en GOLFECH sur la Garono (Tarn-Garonio), en 8 ĉapitroj : 1) Enkonduko. - 2) Historio de la projekto (1962-1979). - 3) Leĝaro rilata al starigo kaj funkciado de nuklea centralo. - 4) Prezento de la funkciado de centralo P.W.R. - 5) La nuklea centralo en la atoma ĉeno. - 6) La konsekvencoj por la ĉirkaŭumo. - 7) La riskoj por la homo. - 8) Pripensoj kaj proponoj. D-ro Philippe Dufetelle, aktivulo kaj ekologiisto, estas membro de A.P.R.I. (Asocio por la protektado kontraŭ la jonigaj radioj) kaj de G.M.I.N. (Medicina Grupo por informado pri la nuklea energio). Li deziras ricevi ĉiajn sugestojn, kritikojn pri sia laboro : 10 rue des Bouches-du-Rhône, F 31500 Toulouse.

El "L'Impatient", 14 bd. Sébastopol
75004 Paris

Legindaĵo ! Emilie CARLES : "La Soupe aux herbes sauvages" verko de instruistino de la franca regiono "Altaj Alpoj". Tiu filino de malriĉa kamparano konis la malglatan vivon de la montaraj kamparanoj antaŭ la unua mondmilito. Ŝi perdis sian patrinon, kiam ŝi estis nur 4-jara. La vivo en la farmbieno estis tre malfacila. Kelkajn jarojn poste okazis la milito de 1914-18, en kiu Emilie perdis sian fratinon, sian fraton kaj bofraton. De tiu tempo ŝi komprenis la stultecon de la militoj. Post diversaj malfacilaĵoj, ŝi sukcesis fariĝi instruistino. Ŝi edziniĝis kun Jean CARLES, pacisto kaj liberamanto. En 1936 ili malfermis popolan hotelon por akcepti la legantojn de la tiamaj gazetoj "L'En-Dehors" kaj "La Patrie Humaine", kiuj venis en la montaron pasigi siajn unuajn libertempojn. Dum sia tuta vivo Emilie Carles provis malfermi la cerbojn de siaj lernantoj al la ideoj de paco kaj justeco. Ŝi mortis lastjare, batalante ĝis la fino kontraŭ projekto de granda vojo tranĉonta la montaron kaj ŝi helpis la paralelan gazeton "Transhumances" pri la Alpoj problemoj. Tiu libro ne estas romano sed viva eltranĉaĵo de vera pacisto kaj amanto de libereco kaj belco.

J.G.



* Periodeco : Kvankam "Laùte" aperis 8-foje en 1979 (224 paĝoj kun la adresaro), sentiĝis manko, ĵarfine, pro la neapero de n° en novembro. Ĵaklino kaj la Tuluza E-Asocio tial ne povis informi pri lokaj aranĝoj en decembro. Ni provos plani alimaniere la

publikigadon en 1980, por ke la bulteno povu pli bone plenumi sian funkcion. Pro temp- kaj monmanko, "Laùte!" ankoraù ne povas fariĝi ĉiumonata, sed...ni paciencu...

* Internacieco : Ĉar nun estas legantoj en 11 landoj, ni povas konstati internaciigon de "Laùte" - sed tio ne estas ankoraù sentebla en la enhavo mem, ĉar la nefrancaj legantoj ankoraù ne esprimas sin en ĝi. Ni aparte bonvenigas iliajn kontribuojn ! La enhavon nun regule riĉigos la debatoj per ĉenleteroj. Nefrancaj ĉenleteranoj estas bonvenaj ! Ankaù tem-enkondukoj...

* Ofsetado : Ĉar "Laùte" meznombro aperas per nur 300 ekzempleroj kaj ĉar la ofsetado estas pli delikata afero ol mimeografado, ni provizore rezignas uzi tiun pres-rimedon.

* Abonantaro : La abonantaro kreskis de 175 en 1978 ĝis 232 en 1979. Jam novaj abonoj alvenas. Sed progresado en la venontaj jaroj dependos ĉefe de la fideleco de la malnova legantaro kaj de ties varbemo. Notinde, ke unufoje ni aperigis reklamon pri "Laùte" (en "Sennaciulo" kaj "SAT-Amikaro").

* Adresaro : Nova adresaro aperos ĉi-jare, verŝajne en junio, kiam estos finita la registrado de abonoj por 1980. Jam informu la abonantoj pri la anoncetoj, kiujn ili deziras aperigi en ĝi (korespondado, gastigado, grupadreso, ktp).

* Monbilanco aperos en la venonta numero :

FINE de FEBRUARO

* Broŝurservo : Kvankam "Laùte!" kaj la "Broŝurservo de SAT" estas du apartaj aferoj - tamen prizorgataj en la sama uzino (1 laboristo, 1 direktoro, 1 balaisto en ununura persono, kiel la sankta Triunuo) "Laùte!" regule informas pri la aktiveco sur la broŝura kampo - ŝvitoplana. En 1980 eĉ aperos sub la ŝildo de "Laùte!" broŝurego 168-paĝa, speco de esperanta frazeologio ariginta 5000 esprimojn sub la titolo "Kiel diri?...". Kompilinto: kdo LENTAIGNE. Prezo : 15 FF (afrankite). Rabato (20%) por libroservoj aù por minimume 5-ekzemplera mendo. La broŝurabonantoj ricevos ĝin aùtomate. Aliaj personoj povas jam antaùmendi al La Juna Penso, F47340 Laroque. Pĉk: 337404M Bx. Kribo

Nia felietono : TRA LA MONDO PER BICIKLO ...

Sabaton 19an de aprilo 29 : Post ĉirkaù 6 horoj por trabicikli nur 36 kilometrojn, mi trafis STALINGRADON per kotplena vojo, trahakita de multnombraj riveretoj. Mi laùiris Volgo-n plurajn kilometrojn. Ĉ. tagmezo, esperantistino alvokas min kaj invitas min siahejme, kie ŝi regalas min per abunda manĝo.

Mi estas en la ĉirkaùaĵo de Stalingrado. Vastega amaso da ligno flosas sur Volgo, kie zumas lignosegejoj. Des pli surpriza estas tiu amasego, ke ligno estas kvazaù nevidebla kaj netrovebla en la regiono, kiun mi ĵus trabiciklis, kaj kie la kamparanoj hejtas nur per pajlo kaj bovinfekaĵo brikforme sekigita.

Nun mi renkontas multajn kamelojn, kiuj anstataùas la ĉevalojn sur la tervojtoj, kaj tiel mi alvenas en Stalingrado mem, ankoraù vundita pro la ruinoj de la civila milito, kiu tie furiozis, kaj post la spuroj lasitaj de la terura incendio, kiu detruis 5000 lignodomojn en 1912. Ĝi estas vastega konstru- kaj rekonstru-laborejo. La pluvakvo ravinigas la stratojn, ĉar ankaù tie mankas kloakoj (en 1929), kaj svarmas porkoj kaj hundoj. Poste, alvenante en la centron, mi rimarkas belajn tramojn, belajn modernajn domojn kaj bitumitajn stratojn, sur kies randoj multaj domoj estas konstruataj. La katedralo superas la tuton, kaj multaj verdkupolaj preĝejoj aldonas stampon de fiera lukso meze de l'ruinoj kaj de l'laborkampoj.

Mi rapide malkovras k-dojn MUHIN kaj HERICK - kuracistoj - kiuj akceptas min kun tiu slava simpatio de mi nepriskribebla... Post la vespermanĝo mi iras al la Popoldomo, unu el la plej belaj konstruaĵoj de la urbo, kie la loka E-grupo kunvenas kaj kie, kompreneble, mi prelegas. La 25an de aprilo, mi forlasas Stalingradon. La 26an de aprilo : estas mia 23a datreveno !

La 1an de majo 29 en Nikolajevsk :

Mi ĉeestas grandan ĉar-defiladon, kiu prezentas Chamberlain kaj ties rearmadon, Musolini kiel dancistinon, Pildsudski generale vestita, la Societo-n de l'Nacioj simboligita de dika sinjorino, Trocki kliniĝanta antaù burĝo, malnovajn eminentulojn ridindigitaj per grandaj nazoj kaj longaj oreloj, la burokratiston, kiun simboligas la kadavro de

homo, kies ĉerkon kovras diversaj paperaĉoj... Ĉiujn tiujn ĉarojn tiras kameloj. Defilas ankaŭ la infanoj el la lernejoj, la Komunista Junularo, la laboristaj kaj kamparanaj sindikatoj, sportaj kaj muzikaj societoj, policistoj sen armiloj, sume la tuta vilaĝo.

Poste, mi atingis aŭtonoman germanan respublikon ĉe Volgo. Noto : Sur la tuta teritorio tiel ekzistas kvazaŭ aŭtonomaj distriktoj, kie oni parolas nur la germanan kaj kie la germanaj moroj estas karakterizaj. La domoj kaj stratoj aspektas pli bele, sed la akceptado estas malpli varma...(...)
"La gastamo estas inverse proporcia al la grado de komforto de la popoloj..."

Merkredon 11an de majo 1929 : Jam de tri tagoj mi estas en Moskvo. Ĉi-foje rapide estas solvita la problemo de la vizo. Krome, la soveta Turisma Klubo promesas helpon al mi por realigi aparaton ebligantan ruliĝi bicikle sur la reloĵ de la fervojo por pli facile traŭri Siberion.

En la ĉirkaŭaĵo de Moskvo mi vizitas metilernejon, kaj ankaŭ reedukejon por la prostituitinoj. La laboro konsistas en fabrikado de ŝtrumpoj. La virinoj estas pagataj, kiam ilia laborkvanto estas sufiĉa. Ili povas libere eliri. Poste ili estas sendataj en uzinojn, kun la ordinara laboristaro, sed kontrolas ilin speciala sociala servo.

La 22an de majo, mi forlasas Moskvon. Mia celo : Vladivostoko kaj Japanio. Vojo : la transsiberia fervojo.

Lundon 27an de majo : Hieraŭ mi alvenis en NIJNI NOVGOROD, tre bela urbo ĉe la dekstra bordo de Volgo, ĉe la kunfluejo de Oka. Konstruita sur monteto la urbo superas la valon de Volgo, kiu, pro la neĝfandiĝo, fluas vastege kaj majeste, inundante la malaltajn kvartalojn. Neimagebla la akcepto, kiun oni faras al mi ! Ĉirkaŭas min almenaŭ 500 personoj.
La 28an de majo : Jam de du tagoj mi estas tie kaj rabas mian tempon ĉiam la sama problemo : ripari la biciklon, kiu, pro la aĉaj vojoj, eluziĝas rapide. Kaj ĉiam la sama procezo : vizito al la sporta klubo, kiu sole kaj oficiale povas respondeci pri la riparado. Tio postulas senfinajn palavrojn inter miaj esperantistaj interpretantoj kaj ilia kunparolanto...

(daŭrigota)

ALFA-BETA.

** KIEL ABONI al "LAŬTE!" **

"Laŭte!" estas abonebla de ĉiu ajn. La abono al "Laŭte!" estas ligita al neniu aniĝo. Ĝi rajtigas sin esprimi libere en la bulteno kaj ricevi la adresaron de la tuta abonantaro. En "Laŭte!" aŭ en ĝia adresaro la anoncetoj estas senpagaj.

Abono por 1980 :

- * en Francio : 12 FF (aŭ ekvivalento per PM)
- * en aliaj landoj : 15 FF (aŭ 9 irpk.)

Perantoj :

- * Belgio : ni petas peranton tie !
- * Britio : Neil BOTTOMLEY, Royal Station Hotel (Staff)
Paragon Square, HULL, W.Humberside.
- * Germanio : G.KUNZE, Panoramast.25, D 7290 FREUDENSTADT 1.
- * Italio : ni petas peranton tie ! (pĉk 41564-705 Stuttgart)
- * Hispanio : ni petas peranton.
- * Japanio : MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16,
TAKASAGO, Hyogo-ken, 671 01
- * Nederlando : Bert de WIT, Leidsevaart 52
NL 2114 AD VOGELENZANG
- * Skandinavio : Pelle PERSSON, Svartviksvägen 14
S 123 52 FARSTA (pĉk: 684161-3)
- * Regionaj perantoj en Francio : la lokaj grupoj de SAT-Amikaro +
- Esperanto-Klubo Renne, 4 rés. St Jean Baptiste de la Salle, 35000 RENNES (pĉk: 391 45 W Rennes)

Sidejo de "Laŭte!" : Cercle espérantiste de l'Agonais, F 47340 Laroque Timbaut, Francio.

Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux, je la samaj nomo kaj adreso.

Broŝurservo : je la nomo de : La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut. Pĉk: 3374 04M Bordeaux.

Directeur:Simonet. Imprimeur:Baudé, 47340 Laroque.CPPAP 58651

V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J

* En Ĝirondio

Oktoobra kunveno en LA BURTHER, proksime
de VILLANDRAUT

Tiel plezure kiel kutime renkontiĝis dek-du Ĝirondiaj ge-
esperantistoj, inter tiuj kvar gejunuloj, la 20an de oktobro
en proprasence verda loko, kie atendis por nin gastigi niaj
geamikoj Ŝelin' kaj Milu en sia kamparano.

Ni tien veturis kun la espero posttagmeze piediradi tra la
tuo apuda pinarano samtempe ekzerciĝante pri la E-praktiko.
Sed oportune venis al ni la ideo jam antaŭtagmeze ekpaŝi sub
la plej proksimaj arboj ; ne malprave : antaŭ ni neatendite
aperis multnombra familio de blankaj, elegante altĉapelaj
fungoj. Tiuj post tuja kradrostiĝo konsistigis regalono por
la tuta kunvenantaro piknikanta sub dubegriza ĉielo.

Tiam mire kaj admire aŭdis ni la rakonton de Michel Bauret,
21-jara komencanto : lastan someron post nur sep lecionoj en
"Cours Rationnel" li perbicikle vizitis kelkajn landojn en
centra kaj orienta Eŭropo, kie li renkontis plurajn tieajn
esperantistojn. Sukcese ! "Helpate de Esperantaj adresaro
kaj... vortaro", li aldonis. Tamen !...

Kiel agrable posttagmeze grupiĝi antaŭ kamenfajro ! Ĉefe
kiam Ŝelin' surtable disponigas al ni marmiton plenan je
varmegaj kaŝtanoj... Eble loka produkto, tiel gustuminda,
kiel la fungoj.

Funkciis la makzeloj ; ankaŭ la langoj... ne ĉiam en Espe-
ranto ! Ĉu pro la malstreĉiĝo de momenta vivo plenaera ? Ĉu
pro la ĉeesto de kelkaj komencantoj ? Ĉu pro la esceptokaza
neĉeesto de nia grupsekretario, kies influhava seriozeco
kutime "oficialigas" la kunvenon ?

Ho, kial menciis nian tiaman kulpeton ? Eble nur pro tio,
ke ĝi vere estas eksterordinara fakto en nia medio.

En Gujan-Mestras...

En Gujan ne ĉio okazas tiel bone kiel ni deziras. Estas
kelkaj malicemuloj, kiuj ne ŝatas nian poresperantan laboron;
kaj eble tie kuŝas nia obstino. El tia obstino rezultas, ke
dank'al la estraro de la duagrada lernejo, la grupo organizis
du kursojn, kiuj okazas ĉiusemajne kun proksimume tridek ge-

lernantoj entute ; plie, la kutima kurso de la plenkreskuloj kun dekkvar gelernantoj.

Ni bezonis unu monaton, tre malfacilan, por komenci kaj stabiligi la kursojn en tiu lernejo, pro manko de materialaj rimedoj ; tiuj malfacilaĵoj malaperis, kaj nun ni atendas la rezulton. Sed de nun kontentigas nin la fakto, ke la estraro vizitis nin dum la kurso, gratulis nin pro nia sindonemo, kaj denove diris, ke tiu lernejo restos ĉiam al ni malfermita : Amen!

P. Sevilla.

En Cavignac, la 1an de Decembro...

16 personoj kaj 6 infanoj, partoprenis la e-istan posttagmezon. Estis samtempe propagandkunveno kaj monata kunveno de nia grupo. 3 neesperantistoj ĉeestis.

Unue, franclingve, ni klarigis kio, kial, kiel estas Esp-o. Ni respondis multajn demandojn. La korespondanto de la ĵurnalo "Sud-Ouest" multe skribis kaj li fotis nin. Ni atendu pacience la artikolon ! Poste, esperantlingve, ni interŝanĝis kelkajn informojn. Ni ricevis leteron el Munkena E-Grupo, kaj turismajn prospekt-ojn pri la urbo Munkeno (ĝemela urbo de Bordojo). Eble ni interŝanĝos lumbildojn, kasedojn,... kaj Esperantistojn! Post tiu grava laboro ni ripozis... manĝante kaj trinkante... ne alkoholon! Tamen, finfine ni kantis kaj eĉ dancis okcitanan dancon.

La venontaj kunvenoj de la Ĝirondia grupo :

* en Januaro : la 15an, en CENON, je la 19a horo.

* en Februaro : la 12an, en CENON, je la 19a horo.

* Aĝenia Esperanto-Rondo : Sekve de publika kunveno en ***** TONNEINS, la 9an de novembro, malfermiĝis E-kurso ĉiumerkrede de la 20a ĝis la 22a en la ĉambro n-ro 10 de "Immeuble Tapol". Kvin gelernantoj sub la gvidado de J.C.Gionco.

En Clairac, ĉiusabata kunveno en la urbodomo . Du fidelaj knaboj 13-jaraj bone lernas.

En Aĝeno : neniŭ kurso ĉi-jare.

* En St Briec, la 15an de decembro, okazis la 1a Zamenhofa bankedo de la nova grupo el "Côtes-du-Nord" : ĉ. 30 personoj.

* En CHAMBERY : Kunvenoj okazas ĉiumarde en la Junuldomo je la 20a30. Nun estas 5 lernantoj kaj sume la grupo konsistas el 13 personoj.

Ankaŭ en AIX LES BAINS esperanto estas aktiveco en la Junuldomo. Jen la adreso : M.J.C. - Esperanto - 19 rue Vaugelas, 73100 AIX LES BAINS

* En ARGELES SUR MER (Orientaj Pireneoj) :

La grupo konsistas el 6 anoj, inter kiuj pluraj ankoraŭ studas la lingvon sub la gvidado de S-ro Llech Walter, kiu zorgas ankaŭ pri la kurso de kataluna lingvo. El letero de nia kdo A. Lagoutte :

"Bedaŭrinde, la aliaj grupoj de nia regiono estas tro malproksimaj de ARGELES por organizadi renkontojn. Tamen ni povis partopreni la 8an de decembro belan prelegon de nia japana samideano Hirai Jukio en PERPIGNAN, kiu parolis pri la E-movado en Japanio kaj Sud-Koreio kun monstro de diapozitivaj. Partoprenis ĉ. 30 personoj.

"Eble estas multaj aŭskultantoj de Radio Pekino en E ĉe viaj abonantoj. Mi pensas, ke la agado de niaj ĉinaj amikoj estas laŭdinda de kiam ili liberiĝis el la 4-persona bando kaj ke ili troviĝas ĉe la pinto de la tutmonda E-movado. Laŭ mia vidpunkto, la elsendoj de Radio Pekino en Esperanto celas antaŭ ĉio krei veran amikecon inter la ĉinaj kaj la alilandaj esperantistoj kaj batali por la enkonduko de la lingvo en la internaciajn instancojn kaj preskaŭ ne por ke la eksterlandaj e-istoj aprobu la politikon de Ĉinio. Ili sukcesis fari ĉiutagan elsendon en E de post la 30a de oktobro kontraŭ 2 elsendoj semajne antaŭe. Tio estas bona rezulto, mi kredas.

Se tio estus ebla, interesus min ricevi informojn pri la kaptado de la E-elsendoj de Radio Pekino fare de niaj sud-regionaj amikoj. La elsendoj okazas nun ĉiutage de la 20a ĝis 20a 1/2 GMT sur la ondlongoj 43 kaj 31 metroj sed antaŭ la reorganizado de la elsendoj por la eŭropaj landoj kaj alveno de la ĉiutaga E-elsendo, oni, laŭ mi, pli bone ricevis la elsendojn sur la 26-metra ondlongo, nun ĉesigita. Laŭ la respondo de Radio Pekino al mia protesto kontraŭ tiu ĉesigo, la teknikistoj povos rekonsideri la aferon, se estos sufiĉe da protestoj. Eble estas ankaŭ aliaj geamikoj, kiuj havas saman intereson..."

* E-vivo en STRASBURGO-Neudorf :

ARAN-Esperanto kunvenas ĉiun trian ĵaŭdon de la monato en la lokalo de la kvartala asocio de Neudorf, 14 rue de la Schwanau, apud Polygone (bushaltejo : Saint-Urbain) kaj ellaboris por la unua trimestro de 1980 jenan programon :

* 17an de januaro : Katalunio, mia lando, far k-ino Montserrat CAÑELLAS, de Sabadell.

* 21an de februaro : lernado de fremdlingvoj, far S-ro Adolf SCHÄRGER, lingvo-instruisto en Kehl.

* 20an de marto (atendendas la konfirmo) : atomcentraloj kaj iliaj danĝeroj, lumbildprelego far Roland SCHNELL, diplomita ĥemiisto, de Karlsruhe, poste debato pri la temo, i.a. pri Fessenheim kaj Wyhl (vidu la broŝuron eldonitan de la broŝurservo de SAT).

Antaŭvidita estas ankaŭ perfektiga kurso, kiu okazos la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato je la 19a horo, ekde februaro, kaj verŝajne uzos la lernolibron "Por la praktikantoj".

Parola kurso por komencantoj, franclingvaj aŭ germanlingvaj, estos kreata nur, se estos sufiĉe da petoj. Kontakto la instruontinon telefonante al la numero 44 02 91 post la 7a de januaro.

* HESIO : Semajnfinaj seminarioj okazos en naturamika domo ***** "Auf dem Steinberg" en LANGEN (inter Darmstadt kaj Frankfurt/Main) de la vendredo je la 19a $\frac{1}{2}$ ĝis la dimanĉo je la 14a :

* de la 24a ĝis la 26a de januaro 1980,

* de la 7a ĝis la 9a de marto 1980.

Estos 4 grupoj, de baza kurso por kompletaj komencantoj ĝis prelegoj por partoprenantoj, kiuj flue parolas kaj komprenas E-on. Aliĝon akceptas :

Manfred FÜHRER, Am Stadtpfad 11, D 6236 ESCHBORN/Taunus.

* STUTTGART : La grupo kunvenas ĉiun unuan sabaton de la monato. Informas : J. WINDISCH, Dürerplatz 4, D 7740 NURTINGEN.

* KARLSRUHE : La grupo kunvenas regule kaj organizas E-kurson. Pri la grupo, pri MEM en Germanio kaj pri radioamatoroj, kontaktu Rolandon SCHNELL, Kaiserstr.5, D 7500 KARLSRUHE.

* METZ : La kongreso de la Orienta Federacio de UFE okazos la 26an kaj 27an de aprilo 1980 en Metz. Informas :

Eùgenio DE ZILAH, 39 rue Joseph Henot, F57070 METZ.